Hermann Löns,

# Surerikeje sola

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Varmege brilas de l' suno radi',
surerikeje iradas mi.

La granda ŝton' estas mia cel',
kei saltas sursable la ombro de l'

betuloj branĉpendaj kaj kantas en
ilia branĉar' emberiko jen

la kanton, kiun kantis ĝi
printemmpe, kiam gajis mi.

Hirundoj flugas super mi tra l'
aer' kaj kun ili enmense mi al

mia tre fora amikin',
enpense mi ĉeestas ŝin.

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Heide allein" de* HERMANN LÖNS *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1989-04-28.*

*MR-220-2 / Arg-620-1253 (2012-10-20 09:06:13)*

*Pri la poeto vidu la retejojn* http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns *kaj* http://www.loens-verband.de/.